MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 10

Oktobro 2016 Kol.378/32

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: SAT-kongreso, Gulago, Bicikla ekskurso, Miaj unua kaj dua „La plej“, Seminario en Jevany

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La 89-a SAT-KONGRESO (16. - 23. 7. 2016)

Ĉi-jare la SAT-kongreso okazis en la vilaĝo *Sieber*, kiu situas meze de Germanio en bela valo ĉirkaŭita de arbaroj de la Harz-montaro. Ĝi apartenas al la urbo *Herzberg am Harz - La Esperanto-urbo* kaj distancas de ĝi nur 7 km. Bedaŭrinde tiutempe la rekta vojo estis barita pro laboroj kaj oni devis kromvojaĝi 30 km, kio kaŭzis problemojn al la organizantoj. Dum la semajno okazis laborkunsidoj, prelegoj, debatoj, kunvenis diversaj frakcioj kaj la vesperoj estis dediĉitaj al kulturaj programeroj.

Ĉiuj manĝoj kaj iuj programeroj okazis en la kongres-hotelo *Zum Pass,* kiun posedas esperantistoj. Do, la partoprenantoj ĝuis agrablan etoson dum la tuta semajno. Tuj trans la strato estas agrabla verda ĝardeno kun tabloj kaj benkoj por trankvila babilado. Kelkaj samideanoj loĝis en la proksima bone ekipita kaj komforta feria domo *Haus Diana.* La aranĝon partoprenis naŭdek geesperantistoj el 18 landoj. Sabate dum la

interkona vespero koncertis Ralph Glomp. Li regalis nin per siaj novaj kantoj.

Dum la dimanĉa inaŭguro la ĉeestantoj de diversaj landaj asocioj kaj kelkaj organizaĵoj salutis la kongreson, inter ili ankaŭ tiuj de IFEF. Estis prezentitaj kelkaj freŝaperintaj libroj. Posttagmeze okazis ekskurso tra la Harz-montaro al la pitoreska urbo *Goslar*. Impresis nin la impona konstruaĵo *Kaiser-pfalz*, la iama imperiestra palaco kaj belega urbodomo. Ĉi-jare la urbo Herzberg am Harz festis la dekjaran jubileon de la oficiala alpreno de la krom-nomo "La Esperanto-urbo". Vespere la organizantoj Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar prezentis la Centron de Herzberg, la historion de la urbo, iliajn atingaĵojn kaj aktivaĵojn dum tiu periodo.

Lunde oni prezentis la jarraportojn kaj debatis pri artikoloj aperintaj en Sennaciulo. Rob Moerbeek parolis pri monda federismo kaj pri nuntempaj sociaj problemoj. Kun Guy Martin ni diskutis la temon de klimat-plivarmiĝo kaj influo de la homo al tiu ĉi fenomeno. Sekvis debato pri kapitalismo. Poste kunvenis poresperanta fako, vegetarana kaj komunista frakcioj. Vespere ni spektis dramon "La kredito" de Jordi Galcerán prezentatan kaj majstre ludatan de Georgo Hanzlik kaj Saŝa Pilipoviĉ.

Marde okazis la tuttaga ekskurso al la urbo *Hannover*. En la historia urbodomo ni rigardis maketojn de la urbo en diversaj epokoj. Sekvis vizito de la muzeo *Aŭgusto Kestner*, kiu enhavas kvar malsamajn kolektojn: pri antikva Egiptio, Grek-romia antikveco, numismatiko kaj artmetio. Dum la libera posttagmezo ni promenis tra la urbo malkovrante ĝian belecon. Vespere ni ĝuis prezenton de la loka

zibervala folklorgrupo. Aŭdiĝis popolaj kanzonoj, jodlado (kantado sen teksto kun rapida ŝanĝo inter kap- kaj brustvoĉo) kaj vipado laŭ la ritmo de muziko. Ĉe la fino de tiu vespero juna knabo el Ukrainio prezentis siajn tri kantojn gitarludante. Ĉiuj ĝuis tiun ĉi vesperon.



Merkrede matene estis du kunvenoj: la unua pri la revuo Sennaciulo kaj pri izolitaj membroj. La dua traktis retejojn kaj eksterajn asociojn nees-perantistajn.
Posttagmeze Rob Moerbeek parolis pri stilfiguroj kaj s-ino Gong Xiaofeng (Arko) parolis pri ekologio. Bert de Vit lanĉis interesan temon kaj parolis pri la estonteco de nia vivmedio. Temis pri prognozoj, scenaroj, antaŭjuĝoj, futurologio. Kunsidis LEA-komitato kaj frakcioj de sennaciistoj kaj verduloj. Vespere Peter Kühne prezentis fotojn pri la dua Speciala ekskurso en Nepalo, kiun li partoprenis ĉi-printempe kaj prezentis projekton pri konstruo de Esperanto-domo en Katmandu por NEspA. La SAT-kongreson partoprenis kvin nepalanoj.

Ĵaŭde matene dum la ĝenerala kunveno estis prezentata financa raporto kaj oni resumis la laboron de la kvar komisionoj. Post la tagmanĝo okazis ekskurso al Herzberg. La urba reprezentanto s-ro Guckel bonvenigis la partopretantojn en la *Welf*-kastelo. Sekvis vizito al la urbodomo kaj al la E-centro. En la piedira ĉefstrato troviĝas Esperanto-kafejo kaj ginsenga vendejo. Ĝi estas prizorgata de la esperantista paro Song Jeong-ok (koreino) kaj Harald Schicke (germano).
Ankaŭ tiun ĉi lokon pluraj esperantistoj vizitis. Ili estis ege varme akceptitaj kaj regalitaj per bongusta kafo aŭ teo. Vespere koncertis Ĵak Le Puil akompanata per saksofono de Serĝo Sire. Poste Hideko Huzimoto prezentis Teo-ceremonion.

Laŭ la programo vendrede oni ellaboris Deklaracion kaj Rezolucion. La venonta SAT-kongreso okazos de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2017 en Seulo, Suda Koreio, tuj post la 102-a UK. Liba Gabalda

Historieto de virino, kiu postvivis gulagon

Recenzo pri reaperinta libro de Jiří (Georgo) S. Kupka: Krvavé jahody (esp. *Sangaj fragoj* -Kartuziana eldonejo Praha 2016).

Věra Sosnarová estas unu el la lastaj en Ĉeĥio vivantaj memorantoj de gulagoj en la Stalinisma sistemo. En Rusio ŝi pasigis kontraŭvole dek naŭ jarojn kaj kelkfoje nur hazarde eskapis el la morto. Ŝiajn krudajn travivaĵojn priskribas la libro *Sangaj fragoj* aperinta en nova eldono.



Sub minaco de malliberigo kaj deporto reen en Siberion s-ino Sosnarová ne povis paroli pri sia kaŭzo ĝis la falo de la komunismo. Nur post tio ŝi sciigis sian aferon al la verkisto Jiří S. Kupka, kiu laŭ ŝia rakontado verkis tiun ĉi libron. Věra Sosnarová kaj ŝia pli juna fratino Naďa havis la misŝancon, ke ilia panjo naskiĝis en Rusio, de kie ŝi post la bolŝevisma revolucio fuĝis en Ĉeĥoslovakion. Kiam en la jaro 1945 la liberiganta Ruĝa Armeo venis al Brno, ĝiajn kalkanojn postvenis komisaroj de NKVD, kiuj ĉasadis rusajn elmigrintojn por venigi ilin reen en Rusion. Se oni ne tuj mortigis ilin, oni deportis ilin en gulagon.

Tiel foje vespere du viroj atakis la dometon de la dek kvar jarojn aĝa Věra kaj super ŝi, ŝia patrino kaj fratino por dek naŭ jaroj fermiĝis la akvosurfaco. Por ĉiuj tri komenciĝis vere kalvario-vojo. En la vagonoj destinitaj por brutar-transporto, ili kaj aliaj kaptitaj perfiduloj de la bolŝevisma revolucio, estis transportitaj en Siberion. La vojaĝo daŭris kelkajn monatojn.

Ĉe la vojaĝo ebriaj gardistoj ĉiujn tri sekse perfortis. Sur la finstacio oni forpelis ilin en somera vestaĵo sur neĝon. La patrino travivis en la gulago nur tri monatojn. Poste ambaŭ knabinoj dum ok jaroj laboris 12 horojn tage en arbara barakaro, kie ili senŝeligadis faligitajn arbojn. Ili transvivis malsatojn, siberiajn frostojn, sklavecan laboron,

brutalecon de gardistoj, diversajn lezojn kaj ankaŭ tifon. Věra estis dufoje nur paŝeton de la morto – kaj kiel ŝi nun atestas, ĉion postvivis nur danke al kredo en Dio, kiun ŝi eĉ en la plej malfacilaj tempoj ne perdis. Ĉiuvespere ŝi kaj ŝia fratino preĝis por feliĉa reveno hejmen.

Kiam post ok jaroj, jam post Stalina morto, oni liberlasis ilin el la gulago, ili havis neniajn dokumentojn, kaj tial ili restis pluajn dek unu jarojn en sovetiaj minejoj, fabrikoj kaj gisejoj. En la jaro 1961 ili hazarde surstrate renkontis du ĉeĥojn, kiuj en Rusio traktis pri ĝemeliĝo inter ilia sudmoravia agrokultura kooperativo kaj la loka kolĥozo.

La koncerna moravia kooperativo poste postulis ambaŭ junulinojn kiel malmultekostajn laborfortojn kaj la fratinoj povis reveni hejmen. Ili nur devis skribe konfirmi, ke ili al neniu diros, kion ili en Rusio travivis. Sosnarová tion ne diris eĉ al sia edzo, kiun ŝi poste en tiu sudmoravia vilaĝo trovis. Ĝis la falo de la komunismo ambaŭ fratinoj devis regule registri sin en deĵorejo de StB (Ŝtata sekreta polico) kaj en sovetia konsulejo.
La nova eldono de la libro estas riĉigita per bilda materialo, kiu malsekretigas, ke la heroino de la libro, jam ankaŭ mem rakontas sian historieton dum multaj interbabiloj en la tuta respubliko.
Se ŝi venos ankaŭ en vian urbon, ne lasu ŝian ateston preterpasi, eĉ se via dorso frostos pro tio, larmoj aperos en viaj okuloj, aŭ kaptos vin kolero pro la sinteno de iuj sampatrianoj. Sed ĝi estas okazaĵo kun feliĉa fino, okazaĵo de forta kredo kaj retrovita hejmo. Plejparto de tiuj, kiujn Sosnarová en gulago renkontis, tian feliĉon ne havis kaj finiĝis en amasaj tomboj surverŝitaj per lizolo. Ankaŭ pro ili, tiu ĉi libro estu deviga legado. Esperantigis Josef Hron

Renkontiĝo sur bicikloj

La 3-an de septembro 2016 okazis la renkontiĝo de biciklo-turistoj ĉe la belvidejo Milíř, proksime de la vilaĝo Vysoká nad Labem en la

regiono Hradec Králové. Ĝi estas preskaŭ nova (j.2013) kaj ankaŭ pro tio ĝi estis taŭga kiel nia celo.
La renkontiĝo estis intencita tiel, ke la partoprenantoj atingu la lokon

per propra traceo laŭ siaj fortoj kaj sur la destinita loko ili renkontiĝos kun aliaj samideanoj. Ĉefe danke al la membroj de la grupo E-mental ni estis sep partoprenantoj. El la belvidejo ni povis admiri la ebenaĵon, proksimajn montarojn kaj profundan arbaron. Post tio ni plenumis kvizon, trinkis kaj babilis. Sekvis grupa biciklo-iro al Pardubice, kie la aranĝo finiĝis.
Se la partoprenantoj vidis novajn lokojn, kiujn ili ĝis nun ne vizitis kaj estis kontentaj pri la aranĝo, ne povas esti pli bona premio por mi, kiel por organizanto.
La sekva bicikloturista renkontiĝo okazos verŝajne printempe.

Ladislav Hakl

Ankoraŭ unu kontribuaĵo el la UK Nitro:

Mia unua "la plej"

okazis jam vendrede, la 22-an de julio 2016. Jam en tiu tago svarmis la "ukanoj", kaj same "svarmis" la programoj (kiel oni povas vidi en kongresaj libroj). Do, multaj feliĉuloj kaptis la okazon partopreni la "neoficialan malfermon", kiu efektiviĝis en la urba sinagogo. Ĝi jam ne plu utilas al servoj de juda komunumo (post la milito restis da ili malmultaj), sed nun ĝi servis al la plej granda, por ni plej amata judo (hebreo) - al Ludoviko Lazaro Zamenhof.

Omaĝe al la UK okazis ekspozicio, kiu en formo de koloraj bildstrioj bildigas la biografion de la Majstro... Sed ne nur: ankaŭ la konsekvencojn, kiuj elfluas el Lia vivo kaj koncernas la fenomenon ESPERANTO ĝenerale. Sur grandaj paneloj glorigis L. L. Zamenhofon, Esperanton, sed ankaŭ sian eminentan propagan agadon la esperantistaj verkistoj kaj desegnistoj el la "Zamenhof-centro" en Bjalistoko. Du ĉarmaj samideaninoj el la Centro

"propramane" alportis la ekspoziciaĵojn kaj ili meritis nian dankon - kaj la botelon da "kongresa vino", kiun al ili enmanigis la ĉef-organizanto de la UK - Peter Baláž. Sed ne nur dankovortojn li proklamis; li povis prezenti samteman libron, grandformatan, kies unusola enhavo estas ĝuste la komikso-bildoj, kiuj estis montritaj sur la paneloj. Do - genie, eĉ sprite elpensita kongruo, kiu havis la trian pinton: la menciita libro estis eldonita nur en 101 ekzempleroj - en la nombro, kiu simbolas la UK-on en Nitro. Mi tuj aĉetis ĝin, ĉar - kiel oni povus supozi - sur la vendejtablo ĝi "ne varmiĝis" kaj multaj bedaŭris.

Sed eĉ tiu efekto ne estis la unusola: apude Petro Baláž prezentis sep aliajn librojn (volumetojn), kiuj estis "freŝbakitaj" en lia eldonejo okaze de la UK. Do, estis multaj dankindaj aferoj en la sinagogo - estu nepre menciita ankaŭ la ekspozicio pri Esperanto en Slovakio - en la urbo Nitro plejparte (danke al J. Vajs). La plej alttaksenda fakto estas, ke tion vidis ne nur esperantistoj, sed ankaŭ la urbo-gravuloj, la ĉefurbestro unuavice, kiuj spertis, ke la subteno, kiun ili donis al la UK ne estas vana; ke la urbon honoris pasintaj esperantistoj - kaj eble ĝin ankaŭ "glorigis" la esperantistoj nunaj. La rezulton, kiun alprenis la kunlaboro de esperantistoj kaj oficialaj ŝtataj organoj - tiun mi taksas mia "la plej".

Mia dua „la plej“
La famkonata verko denove en Esperanto

(tradukita el praga bulteno de la Socio de fratoj Ĉapek)

Okaze de la antaŭnelonga Tutmonda Esperanto-kongreso (23.-30.7.) en Nitra, Slovakio, la studentoj de gimnazio en Svitavy – la teatro-grupo DOMA (mallongigo de la ĉeĥa: Tute Malgranda Teatro) preparis la ludon “El la vivo de insektoj“, kies aŭtoroj estas la fratoj

Josef kaj Karel Čapek. La verkon en mallongigita formo kun siaj lernantoj studis ilia profesorino Radka Oblouková, kiu siajn reĝisor-kapablojn pruvis jam antaŭ tri jaroj, kiam la grupo prezentis la ludon R.U.R. (de la samaj aŭtoroj) okaze de la UK en Rejkjaviko, Islando. La prezento okazis en la urba teatro de Andrej Bagár. Pro la kuraĝo ludi en Esperanto kaj pro ĝuo spekti la junecan ĉarmon kaj entuziasmon, ili meritas nian dankon! Margit Turková

La lingva seminario en Jevany

Kiam ni eksciis, ke almenaŭ dimanĉe la 11-an de septembro estos libera kabano en Jevany, ni telefone invitis kelkajn regulajn partoprenantojn de tiu ĉi seminario, ĉu ili volus alveni kaj la lastan tagon de la somero ĝui tiamaniere. Alvenis 14 membroj. Ni diskutis pri interesaj artikoloj, serĉis diversajn formojn de esprimado ĉe la gvido de Margit ĉe kafumo kaj poste ni ĝuis nian reciprokan amikecon ĉe la bivakfajro; ni rostis kaj manĝis kolbasetojn. Bela dimanĉa tago estis inter geamikoj.

J. Rýznarová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová, J. Kosnar
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.